

NECESAS KE LA FILO DE LA HOMO ESTU ALTEN LEVITA – Komento al Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

El la Evangelio laŭ Johano 3,13-17

En tiu tempo Jesuo diris al Nikodemo: «Neniu jam estis en la ĉielo; nur la Filo de homo. Li fakte venis de la ĉielo. Kaj kiel Moseo levis serpenton en la dezerto, tiel devas la Filo de homo esti levata, por ke ĉiu, kiu kredas je Li, havu eternan vivon. Dio tiel amis la mondon, ke Li donis sian ununuran Filon, por ke ĉiu, kiu kredas je Li, ne pereu, sed havu eternan vivon. Dio sendis sian Filon en la mondon, ne por kondamni la mondon, sed por ke la mondo per Li saviĝu».

Dialogante kun fariseo Nikodemo, estro de la Judoj, Jesuo referencas al iu konata epizodo de la historio de Izraelo, entenata en la Libro de Nombroj.

Je ĉapitro 3, versiklo 14 la evangeliisto skribas: "*Samkiel Moseo levis la serpenton en la dezerto*", la serpentoj estis senditaj de Dio por puni la popolon laŭ la klasika skemo de "puno-savo/ pardono". En Jesuo male estas nur savo.

"*Tiel devas esti levata la Filo de la homo*", Jesuo rilatigas sin al sia estonta morto surkruce kaj parolas pri la Filo de la homo, tio estas la homo kiu havas la plenecon de la dia kondiĉo. "*Por ke ĉiu ajn kiu kredas je li havu*

eternan vivon” – kredi je la Filo de la homo signifas aspiri al homa pleneco kiu brilas en tiu filo de la homo.

Unuafoje aperas en tiu ĉi evangelio temo tre kara al la evangeliisto, nome tiu de la eterna vivo. La eterna vivo ne estas, kiel instruis la fariseoj, estonta premio pro la bonkonduco en la estonteco, sed vivkvalito jam en la estanteco. Kaj ĝi nomiĝas “eterna” ne tiom pro la senfina daŭro, kiom pro la nedetruibla kvalito.

Kaj tiun eternan vivon oni ne havos estontece, sed oni jam havas. Kiu ajn aliĝas al Jesuo, aspiras do al la homa pleneco kiu rebrilas en Jesuo.

“Dio fakte tiel amis la mondon ke li donis sian ununuran Filon”, la Dio de Jesuo ne estas Dio kiu postulas, sed Dio kiu proponas, kiu eĉ proponas sin mem. “Por ke ĉiu, kiu kredas je Li, ne pereu, sed havu eternan vivon”.

La eternan vivon oni ne akiras, kiel instruis la fariseoj, observante la leĝon, nome kodon fremdan al la homo, sed aliĝante al la Filo de la homo. Kaj Jesuo aperas ĉi tie kiel la donaco de la Dia amo por la homaro. Dio estas amo kiu deziras manifestiĝi kaj komuniki. Kaj Jesuo estas la plej alta esprimo de tiu manifestiĝo kaj komuniko de Dio. *“Dio fakte neniam sendis la Filon en la mondon por kondamni”*, ankaŭ se ĉi tie la verbo ne estas kondamni, sed *“juĝi la mondon.”*

Refoje ĉi tie Jesuo estas parolanta kun iu fariseo, li detruas la atendojn pri iu mesio juĝanta la popolon. La Filo ne venis por juĝi la mondon, *“sed por ke la mondo estu savita pere de li”*. Dio estas amo kaj en li estas nek juĝo nek kondamno, sed estas nure vivpropono.